

februaro 1970


63-a jaro

n-ro 771 (2)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176, rotterdam-2, nederlando - red. v. sadler



Satelitoj:

kultura
hegemonio
en dek jaroj?

Vi trovos

gravan novaĵon kaj gravan alvokon sur la apuda paĝo. En la lastaj jaroj la altiĝantaj kostoj de niaj asociaj eldonaĵoj devigis nin redukti iom la amplekson, tiel de la Jarlibro (precipe la dua parto) kiel ankaŭ de la revuo "Esperanto". Unu el la celoj de la investoj priskribitaj en la ĉef-artikolo estas: iom post iom redukti la produkto-kostojn de la eldonaĵoj de UEA kaj pliriĉigi ilian enhavon. Se oni konsideras, ke certe pli ol la duono de la elspezoj de UEA koncernas ĝiajn oficialajn eldonaĵojn, oni komprenos la gravecon de la plano. Modernigo estas ĉiam multekosta entrepreno en la komenco, sed ĝi ne nur donas longedaŭran avantaĝon poste, sed estas nepre necesa, se nia movado volas efike labori en moderna mondo.

Enhavo

- 21 Novstila Centra Oficejo
- 22 Post 1975: la televid-milito (Bezençon)
- 22 La angla perdas terenon en aziaj lernejoj
- 22 Nova faka asocio por inteligentuloj?
- 23 Esperanto programita (Test 5000)
- 24 Skoltaj rezultoj
- 25 Komputilo komparis Esperantajn verkojn (Maas)
- 26 Lerneja Bulteno n-ro 16: 1970 — Internacia Jaro de Edukado
- 28 Recenzoj
- 28 Nekrologoj Duncan, Fineman, Grimsson, Anjo, Ito
- 29 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 30 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 31 Ekzamenigu vin! (Internacia ekzamena komisiono)
- 31 55a Universala Kongreso de Esperanto, Vieno, 1970
- 32 Kurso en la franca radio
- 32 En tio ĉiu povas helpi! (poŝtmark-kolektado)
- 32 Leteroj de legantoj
- 33 Enrajna postbabilado (TEJO)
- 34 Kalendaro por februaro-aŭgusto
- 34 Kreskis la asocia membraro (Oficiala informilo)
- 35 Venko finna-greka (Internaciaj konkursoj 1969)
- 36 Anoncetoj

La kovrilo

Laŭplane, jam en la jaroj 1975-1980 okazos la unuaj rektaj televid-dissendoj per telekomunikaj satelitoj, t.e. rekte el la satelitoj al la riceviloj de unuopaj hejmoj. Tiam jam ne eblos eviti, ke ekestu danĝero de kultura, politika kaj lingva superrego de la grandaj super la malgrandaj nacioj. Tiam jam nur tri satelitoj sufiĉos por atingi 90 % de la monda loĝantaro — sed en kiom da lingvoj? Ĉu tiam malaperos la rajto de malgrandaj popoloj pri programoj en la propra lingvo? Ĉu tiam ekestos mort-batalo inter la lingvoj de la grand-potencoj? Sur paĝo 22, eminenta fakulo diskutas tiun kaj ligitajn demandojn.

(Foto: satelito "Early Bird")

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Ned. Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1883-1910).

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo"

Aperas monate (escepte de aŭg.)

Abonprezo por unu kalendara jaro 22,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto aldonu: Aŭstralio kaj Nov-Zelando 13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap., Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono, Meks. 5,50; Israelo 2,75.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.; 1/2 p. = 150 gld.; 1/4 p. = 85 gld.; 1/8 p. = 50 gld.; 1/16 p. = 35 gld. Kliŝokostoj ekstere. Ripet-rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-3001.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers, Rotterdam-3006.

Legantoj en ĉirkaŭ 80 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, landaj kaj fakaj asocioj, delegita reto kaj diskonigo de la agado de UEA: Prof. d-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Brit. Vic-prezidanto kaj estrarano pri komercaj kaj industriaj rilatoj: S-ro E. L. M. Wensing, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hällabrottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj lernejoj: S-ro G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, Germanujo. Estrarano pri TEJO kaj junularaj aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161 Merken, Andreasstr. 57, Germanujo.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue Léon Cogniet, F-75-Paris (17e), Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj eldonaĵoj: S-ro J. Uŝpienski, Str. KRN 1 m 41, Warszawa 1, Polujo. Estrarano pri financoj kaj administrado: S-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem, Ned.

NOVSTILA CENTRA OFICEJO

En la Dua Laborplano de UEA, kiel jam en la Unua, oni legas sub "Internaj taskoj": "modernigi la oficejon per nuntempaj oficejaj instrumentoj, eventuale per malgranda moderna presmaŝino por publikigo de diversaj bultenoj kaj informaj materialoj". Efektive, laŭgrade kiel vastiĝis la agadoj de la Asocio, la Centra Oficejo necese devis ekipi sin per pli modernaj maŝinoj: por adresado, kopiado, librotenado, kalkulado ktp. Plej laste — en la pasinta novembro — la Estraro decidis, ke alvenis la momento por plenumi ankaŭ tiun "eventualan" taskon starigitan en la Laborplano: akiri proprajn presrimedojn.

De post 1955 la pres-teknikoj rapide evoluis. "Malgranda presmaŝino", kian aludas la Laborplano, troviĝas jam en ĉiuj iom grandaj entreprenoj kaj ebligas surloke, senprokraste kaj en laŭbezona kvanto produkti proprajn malgrandformatajn presaĵojn, kiel kovertoj, formularoj, mendiloj, aliĝiloj kaj bultenoj. Samtempe la foto-ofsetaj metodoj, de kiuj dependas tiaj maŝinoj, tiel perfektigis, ke ĉiam pli da ĵurnaloj, revuoj kaj libroj estas presataj hodiaŭ per similaj sistemoj. Nur unu ekzemplon: la konata revuo de Unesko, *Kuriero de Unesko*, almenaŭ en la angla, franca kaj kelkaj aliaj grandkvantaj eldonoj aperas ofsetite. Ĉiuj, kiuj iam admiris ĝian grafikan aspekton, komprenos, kiajn variajn kaj plastikajn eblecojn proponas al ĝiaj redaktoroj la modernaj presmetodoj bazitaj sur la uzo de fotografiaj filmoj, kompare kun la malnovaj sistemoj uzantaj metalojn.

Paralele kun la evoluo de la pres-metodoj okazis ankaŭ granda progreso rilate la kompostolaboron. Ekzistas nuntempe pluraj sistemoj, ĉe kiuj la literoj estas rekte projekciataj aŭ taj-


pataj sur filmon aŭ paperon, tiel ke la tuta laboro kun plumbo aŭ metalaj literoj malaperas. Unu tia sistemo estas la maŝino *Composer* de IBM, kaj tian maŝinon ĵus akiris — la 15an de januaro — la Centra Oficejo de UEA. Por doni al la legantoj ian ideon pri ĝiaj kapabloj, ni kompostis ankaŭ tiun ĉi artikolon per la dirita maŝino. Temas esence pri tre mult-kapabla skrib-maŝino, kiu tajpas la literojn sur bonkvalitatan paperon per karbona (dense nigra) rubando. Kiel vi vidas, ĝia skribo apenaŭ estas distingebla disde tiu de klasika komposto-maŝino. Ŝanĝi de literoj normalaj al *kursivaj* aŭ *dikaj*, de unu liter-grandeco al alia aŭ de unu litertipo al alia estas afero de nur kelkaj sekundoj.

Helpe de la nova kompostilo, la Centra Oficejo povos de nun per propraj fortoj plenumi multajn laborojn, kiujn ĝi antaŭe devis konfidi al aliaj. Tio devas signifi konsiderindajn ŝparojn je la produktokostoj de multaj el la ĝisnunaj eldonaĵoj. Samtempe ĝi prezentas eblecon draste levi la kvaliton de diversaj materialoj, ekzemple la dokumentoj de CED, kiuj ĝis nun ankoraŭ estas plej ofte nur stencilataj.

Laŭ la perspektiva plano aprobita de la Estraro, la komposto-maŝinon sekvos, en oportuna tempo, fotografia aparataro por la prespretigo kaj, fine, la "malgranda presmaŝino" de la Laborplano. Kiam tiu stadio estos atingita, la Oficejo estos ekipita per kompleta presejo por ĉiuj malgrandformataj eldonaĵoj kaj per la rimedoj por fari mem gravan parton de la produkto-laboroj por ĉiuj aliaj eldonaĵoj.

Ni firme kredas, ke la modernigoj priskribitaj signifos, unue: doni pli valorajn kaj variajn eldonaĵojn al la membroj kaj al la movado entute, kaj due: prezenti, per modern-aspektaj dokumentoj, indan vizaĝon al la mondo. V.S.

La komposto-maŝino IBM 'Composer' ne estas pli granda, ol normala elektra skrib-maŝino....



HELPU FINMODERNIGI VIAN CENTRAN OFICEJON!

Nun ni realigas ankaŭ tiun eron de la Baza Laborplano: UEA havos sian propran ofsetan presejon. La sumo, kiun la Asocio devas investi por tiu celo, ne nur utila el vidpunkto de produktokostoj, sed vere necesa por plua vastigo de la agado, ne estas malgranda. La tuto — kompostilo, fotografia aparataro, presmaŝino — kostos ĉ. 40 000 gld. Mi fidis, ke estas eble havigi almenaŭ parton de tiu sumo per kolektado de donacoj por tiu speciala celo. En la nomo de la Estraro kaj en mia propra, mi petas ĉiujn membrojn, precipe la pli bonstatajn, abunde kaj rapide kontribui por la presejo de UEA. Viajn donacojn bv. sendi aŭ rekte al la C.O. aŭ al la ĉef-delegitoj kaj perantoj kun indiko "por la presejo". Helpu finmodernigi la Centran Oficejon de via UEA!

Anticipan dankon!

Ivo Lapenna, Prezidanto



POST 1975: LA

Svislando dissendas siajn nunajn televid-programojn en tri lingvoj (germana, franca, itala — se oni esceptas la svisgermanan dialekton kaj la erojn en la romanĉa lingvo), kio ebligas al ĉiu lingva regiono havi sian elsendon. Tiu plurlingva dissendado postulas ampleksajn teknikajn rimedojn, kaj ne ĉiam Svislando povas ilin fronti memstare. Ekzemple, por raporti la unutagan viziton de Papo Paŭlo VI en Ĝenevo, ni devis peti la kunlaboron de tri eksterlandaj televid-organizaĵoj, kaj tiu programo estis liverita al 18 landoj partoprenantaj en EUROVISION. Se Eurovision ne ekzistus, oni tute ne povus prezenti la grandajn eventojn, kiel la Olimpikoj aŭ la vojaĝoj de Apollo al la luno. Fakte, sen Eurovision, la organizaĵoj luktus inter si por akiri monopolojn kaj privilegiojn, strebante al hegemonio, kontraŭ la intereso de la postlasitoj, t.e. la malgrandaj nacioj.

Marcel Bezençon estas la ĝenerala direktoro de la Svisa Radio-Societo (+SSR). En tiu funkcio estas lia devo sekvi proksime la evoluon, nunan kaj estontan, de internacia telekomunikado kaj konsideri ĝin en rilato al la intereso de la svisa popolo. Ĉi tiu (koncizigita) TV-prelego, en kiu s-ro Bezençon klare prezentas la minacon de kultura imperiismo en la kosma epoko, meritas la atentan pripenson ne nur de la svisoj, sed de ĉiuj popoloj.

La angla perdas terenon en aziaj lernejoj

Definitiva estas nun la decido, ke ekde la jaro 1973 la angla lingvo ne plu estos deviga studobjekto en japanaj lernejoj. En marto (vidu "Esperanto", majo 1969, p. 79) tion proponis komisiono de la Ministerio pri Instruado. Fine de septembro la raporto estis akceptita kaj aprobita. La lastatempa refoja venko de la reganta Liberal-Demokratia Partio en la tutlanda balotado signifas, ke ĝia efektivigo estas jam certa, kaj ke la angla lingvo en orienta Azio perdos gravan terenon.

Aliflanke, la malvenko de la Japana Socialista Partio signifas, ke ne efektiviĝos ĝia propono pri deviga instruado de Esperanto ("Esperanto", 1967, marto, p. 38). Almenaŭ io tia nuntempe ne estas antaŭvidebla. Tamen la malpligravigo de la angla lingvo sendube donas al Esperanto pli da ŝancoj en la lernejoj, ol ĝi havas ĝis nun.

NOVA FAKA ASOCIO

Lastatempe aŭdiĝis sugestoj pri kunlaboro inter membroj de UEA kaj membroj de Mensa. Tial iom da informoj pri tiu internacia organizaĵo interesos la legantojn.

Kiel UEA mem, Mensa estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, ktp. Ĝi formiĝis en Anglujo en 1945, sed dum postaj jaroj naciaj filioj formiĝis en multaj landoj: Francujo, Germanujo, Svedujo, Svisujo, Aŭstralio kaj aliaj. Kresko estas rapida, kaj la usona membraro jam ampleksas pli ol 10 000.

La celoj de la organizaĵo inkluzivas sciencan esploradon en la kampoj de psikologio kaj socia scienco kaj la plifaciligon de sociaj kaj intelektaj kontaktoj inter membroj kun similaj intereso. La kvalifiko por aliĝo estas, ke membroj devas posedi inteligenton pli altan, ol 98 procentoj de la homoj, alivorte en la plej altaj du centonoj.

En multegaj urboj estas lokaj grupoj. Krom sociaj renkontiĝoj ekzistas kelkloke specialaj projektoj, ekzemple rilate al edukado de altinteligentaj infanoj.

Kanada iniciato

Kompreneble, en tia organizaĵo estas lingva problemo. Dum multaj jaroj individuaj membroj fojfoje menciis Esperanton en gazetoj de Mensa, sed nun kelkaj membroj faras novan paŝon. Antaŭe

TELEVID - MILITO

Jam de 15 jaroj, la membroj de Eurovision rajtas re-elsendi laŭdezire ĉiujn proponitajn erojn kaj partoprenas finance nur proporcie laŭ la nombro de la propraj abonantoj. Tio estas konforma al la devizo "unu por ĉiuj, ĉiuj por unu" aplikata ĉe Eurovision — kiu cetere jam suriras aliajn kontinentojn, dank' al la komunikad-satelitoj. Nuntempe la televido estas internacia, kaj ĝi eniĝas en reton, kiu ĉiam pli envolvas la planedon.

Politiko postrestis

La 10an de julio 1962, la lanĉo de la satelito TELSTAR inaŭguris la kosman epokon de telekomunikoj. De tiu tempo la satelita tekniko antaŭeniris je tia rapideco, ke la instituciaj aranĝoj ne plu kapablis sekvi ĝin kaj plene ekspluati la novajn rimedojn. Nuntempe, en multaj eŭropaj landoj oni ankoraŭ pritraktas tiun teknikan progreson laŭ administraj kutimoj kaj politikaj konceptoj tute maladekvataj, kiuj riskas tre baldaŭ stari senpovaj antaŭ faritaj faktoj.

Hodiaŭ, la trans-sendoj per-satelitaj iras de punkto al punkto, inter du surteraj stacioj: unu elsendanta, la alia kaptanta. Tio ebligas al ĉiu televid-stacio akcepti aŭ rifuzi la proponitan eron. Oni do povas apliki kontrolon ĉe la elekto; an-

koraŭ oni povos apliki ĝin ĉe la sekvonta stadio, tiu de la disdonantaj satelitoj. Tiam sufiĉos nur malgrandaj ter-stacioj por kapti kaj re-elsendi la programojn.

Sed jam la alveno de tiuj perfektigitaj disdonantaj satelitoj postulos la starigon de novaj naciaj kaj internaciaj kontraktoj. Tiu novaĵo verŝajne koincidos kun la apero de alsendado de la ondoj per du-aksaj kabloj ĝis la ricevilo de la telespektanto, kiu tiam povos elekti inter dudeko da programoj.

Por la jaroj 1975-1980 oni antaŭplanas rektajn dissendojn persatelitajn. La programo alvenos sur la ricevilon de la spektanto, rekte el la satelito. Tri tiaj satelitoj sufiĉos per atingi 90 % de la tera loĝantaro! Kaj tio post maksimume dek jaroj!

Ni opinias, ke ni tiam ne povos eskapi al multego da bildoj alsenditaj plej ofte pro politikaj kaj komercaj propagandaj celoj. La arbitra utiligo de la spaco estas jam en multegaj landoj, kiuj ne estas "kosmaj potencoj", unu el la plej grandaj angoroj de la proksima estonteco.

Demandoj elŝprucas...

Pro la teknologia malfruo de Eŭropo, ĉu la rekte-disdonajn satelitojn ekspluatos nur kelkaj grand-potencoj? Oni esperas eskapi tiun danĝeron, kiu donus al kelkaj potencon sen-precedencan en la historio. Sed, eĉ se ni sukcesas ricevi anguleton en la satelito, kiom da mono ni devos elspezi? Kaj kion ni povos dissendi sur la teron,

POR INTELIGENTULOJ?

ekzistis "special-interes-grupoj" (SIG-oj) en la organizaĵo, sed sub novaj reguloj ili povos ricevi oficialan rekonon de Mensa Internacia. Nun du kanadaj esperantistoj, Philip W. Trubey en Otavo kaj Harry J. Lewis en Halifakso, laboras por formigo de SIG-o por membroj de Mensa, kiuj interesiĝas pri Esperanto.

En "Mensa Journal" (organo de la internacia organizaĵo) aperis en novembro-decembro 1969 letero de sinjoro Trubey, en kiu li emfazis la dezirindecon de kunlaboro inter la du movadoj kaj esprimis la kredon, ke esperantistoj ĝenerale posedas inteligenton signife pli altan, ol la meza.

Estus interesa projekto trovi per sufiĉe granda nombro da testoj, ĉu oni povas konstati statistikan bazon por tiu kredo.

Testoj en kelkaj lingvoj estas uzataj por kontroli la kvalifikon de tiuj, kiuj deziras membriĝi. Ankoraŭ ne ekzistas testoj en Esperanto. Se sufiĉe da esperantistoj interesiĝas pri la afero, eble tiaj testoj estos faritaj. Oni aliĝas al Mensa nur per la naciaj organizaĵoj, kiuj prizorgas la testojn. Informo pri adresoj de naciaj organizaĵoj estas havebla de la organizantoj de la nova SIG-o, kies adresoj sekvas:

S-ro Philip W. Trubey, 827 Thorndale Drive, Ottawa 10, Ontario, Kanado (provizora prezidanto) kaj Harry J. Lewis, Box 1322, North P.O., Halifax, N.S., Kanado (provizora sekretario).



La emblemo de la organizaĵo Mensa

ESPERANTO

cand. paed. Herm. Behrmann

TEST 5000

D-4972 Löhne 1; Tel. 3290

programita

Sekve al la publikigoj en la decembra numero de "Esperanto" (p. 184-185), la varbado por la programita kurso de Hermann Behrmann ricevis novan antaŭenpuŝon. Multaj legantoj kontribuis al la reklam-kampanjo. Dum decembro venis ĉ. 150 novaj aliĝoj al la kurso. La eldonnombro de afiŝoj pri la kurso atingis 95 000, tiu de la reklamslipoj atingis 10 000.

Kiel aludite sur la TEJO-paĝo (p. 33), kelkaj kursanoj jam kontaktis kun la organizita movado, i.a. ĉeestante la seminarion de Germana Esperanto-Junularo en Marburg. Por la 12a de januaro estis aranĝita granda vesperkunveno de la kursanoj en Berlino, reklamita per 12 anoncoj kaj 4 gazetartikoloj. Same en januaro aperis la kvara (kaj lasta) el la kajeroj de la germana kursmaterialo. Tradukoj de la testmaterialo verŝajne aperos post nelonge en la angla, franca kaj nederlanda.

Antaŭvidante, ke la nombro de kursanoj estos ankoraŭ tre kreskinta ĝis la Universala Kongreso en Vieno, UEA envicigis en la provizoran programon de la Kongreso ankaŭ kunvenon de ĉiuj testpersonoj el la kampanjo "Testo 5000" de Hermann Behrmann.

Kiel vermo en frukton

kiam la politiko eniros la dissendojn kiel vermo en la fruktojn, kaj kiam jam nenia nacia kontrolo estos ebla rilate programojn de aliaj landoj falantaj el la ĉielo?

Ĉar la utiligo de la satelitoj estas problemo "registar-skala", ĉu ni ne timu, ke la programoj estos aranĝitaj "registar-propagande" dum tiu fantazia kurado al influo kaj hegemonio?

Tiaj estos eble la ŝanĝoj, kiujn rezultigos la satelita televido, se tiu ne estos regata de monda interkonsento, kiu garantios al etaj nacioj la samajn avantaĝojn, kiel al grandpotencoj.

Droni en feŭdismon

Pro tio la kanada kaj sveda registaroj postulis ĉe U.N., ke la per-satelita radio-dissendado estu utiligata por pacaj celoj kaj sur monda bazo. Se tiuj principoj ne estos observataj, ni riskos droni en feŭdismon, kiu dividos la naciojn en du grupojn: la posedantaj kaj la posedataj.

Jam nun ekzistas internacia konsorcio¹ INTELSAT, kiu celas "establon de unusola monda sistemo de komercaj satelitoj por liveri al ĉiuj regionoj

1. Konsorcio = speco de aĉet-kartelo.


de la ter-globo telekomunikajn servojn". Usono posedas 53 % de la voĉoj en INTELSAT. Superinfluo, kontraŭ kiu luktas pluraj landoj, inter kiuj Svislando. Tiun konsorcion kontraŭas soveta projekto INTERSPUTNIK, kiu donas al ĉiu membro po unu voĉo, tiel ke ĉiu havas la saman rajton kiel ĉiu alia.

La franca kaj germana registaroj decidigis al lanĉo de propra satelito SYMPHONIE en la venontaj jaroj. Samtempe la eŭropaj ŝtatoj studas la projekton de satelito EURAFRICA, kies dissend-reton ekspluatus Eurovision.

El ĉio ĉi evidentiĝas, ke en la tuj venontaj jaroj naskiĝos tuta aro da disdonaj satelitoj, el tre diversaj devenoj — kio povus forviŝi la ideon pri unusola tutplaneda sistemo. Morgaŭ amaso da fremdlandaj programoj eklumos sur niaj televid-ekranoj. Ni do jam de hodiaŭ pensu pri la efikoj de tiu daŭra fremdkultura disĵeto de divers-tendencaj bildoj. Tial ni deziras, ke la svisa televido servu al plifortigo de la kunteniĝo inter la individuoj kaj la diversaj regionoj de nia lando. Pro tio la dua program-reto vaste malfermiĝos al niaj naciaj lingvoj. Ankaŭ nia tria program-reto, kiu komence dissendos eksterlandajn elektitajn programojn, iĝos plia programo kun svisaj verkaĵoj, ekde kiam instinkta nacia neceso komprenigos al ni pli bone, ke ni devas firmteni tion, kio estas al ni kara, tion, kio ni estas, kontraŭ la disatomigaj potencoj, kies efikeco estas nun ankoraŭ malfacile mezurebla.

Skoltaj rezultoj

En pluraj kontinentoj la instru-kampanjo de SEL, bazita sur la sukcesoj en ĵamboreo en Britujo en 1968, gajnas forton kaj rikoltas rezultojn. Dekstre: geskoltoj en Osaka studas la "ĵamborean Lingvon" por starigi Esperanto-tendon en la ĵamboreo sub monto Fuji en 1971.



Ĉu ankaŭ vi kunhelpis en la "Adopta Plano" de Skolta Esperantista Ligo? Ĉu vi almenaŭ memoras, ke temas pri mond-ampleksa kampanjo lanĉita de SEL (unu el la kunlaborantaj fakaj asocioj de UEA) por prezenti la Internacian Lingvon al skoltaj organizaĵoj kaj unuopaj skoltoj? Estas agrable raporti pri bone pripensita kampanjo. Sed ankoraŭ pli agrable, raporti pri ĝiaj sukcesoj.

La kampanjon SEL kalkulas ekde la 22a de aŭgusto, kiam la delegitoj de la Monda Skolta Konferenco en Helsinki ricevis la unuajn ekzemplerojn de "ĵamborea lingvo", la speciala lernolibro de SEL. Preskaŭ en la sama momento ricevis la libron ankaŭ la naciaj skolt-asocioj tra la mondo, krom centoj da lokaj skoltaj grupoj. En la sekvantaj monatoj SEL jam povis registri la unuajn sukcesojn: kursoj por skoltoj komenciĝis en pluraj landoj (en Japanujo, la lando de la ĵamboreoj en 1970 kaj 1971, eĉ deko da kursoj), okazis ekspozicioj, recenzoj, prelegoj. En unu lando la skolta

asocio verŝajne mem donos la libreton al ĉiuj skoltoj, kiuj iros al la ĵamboreo en Tokio. La unua eldono de "ĵamborea lingvo" cetere jam longe elĉerpiĝis, kaj la dua eldono de 5000 ekz. rapide vendiĝas.

Ankaŭ vi povas kontribui al la kampanjo de SEL. Plej simple per tio, ke vi aĉetu ekzempleron de "ĵamborea lingvo" kaj donacu ĝin al iu skolto. La lernolibro kostas 2,50 gld. plus sendokostoj (ĉe la Libroservo de UEA). SEL raportas, ke pro ĝia kampanjo reaktiviĝis jam tri landaj sekcioj. Vi povas kunhelpi, por ke ĝi fariĝu vere forta kaj efike varbu por Esperanto inter la junularo.

Laste SEL anoncis, ke ĝi eldonas malmultekostan (ĉ. 2,— gld.) diskon kun la teksto de la unuaj lecionoj de "ĵamborea lingvo", por helpi al tiuj, kiuj ne havas okazon aŭdi la vivantan lingvon. Ankaŭ ĝi estos mendebla ĉe la Libroservo de UEA.

Komputilo komparis Esperantajn verkojn

Heinz Dieter Maas

En la universitato de Sarlando (Germanujo) estas entreprenita esploro de Esperanto helpe de komputilo. Ni volas mallonge sciigi pri la celoj kaj jamaj rezultoj de la laboro.

La ĉi-tiea laborgrupo por elektrona lingvistiko okupiĝis ĝis nun grandparte pri du problemoj, nome pri komputila sintaksa analizo de germanaj tekstoj kaj pri la maŝina traduko el la rusa en la germanan lingvon. La laboroj sur la kampo de aŭtomata indeksado, entreprenitaj pro privata intereso, intertempe fariĝis oficialaj en la kadro de la analizaj esploroj.

Fari indekson por difinita verko V signifas: listigi ĉiujn vortoformojn el V laŭ alfabeto kaj aldoni al ĉiu la paĝo(j)n kaj la linio(j)n, kie en V ĝi aperas. Indeksi verkon do normale signifas por la interesiĝanto tedan longdaŭran laboron kun slipoj, sed, se oni povas uzi komputilon kaj havas koncernajn programojn, la manlaboro reduktiĝas al kopiado de la indeksota teksto sur trustriojn aŭ trukartojn.

Ĉar tiaj programoj por la germana lingvo ĉe ni jam ekzistis kaj analogaj estis elverkitaj por la bulgara kaj rusa lingvoj, ne plu estis tre malfacile starigi tian programon ankaŭ por la indeksado de Esperantaj tekstoj. La sola neceso estis difini la supersignitajn literojn alimaniere, ĉar en ilia originala formo ili troviĝas nek sur teletajpilo, per kiu oni produktas trustriojn, nek sur kartotruilo. Ni uzis la normalan transskribon de ĉ, ĝ, ĵ, ĥ, ŝ, ŭ kiel CH, GH, JH, HH, SH kaj U. Por distingi la litervicojn ch, gh, ... disde ĉ, ĝ, ... ni konsentis skribi tiujn kiel C/H, G/H ktp. Tia diferencigo estas necesa por vortoj kiel "ĉashundo", por ke el tio ne fariĝu "ĉaŝundo". Tamen, tiaj komplikaĵoj poste ne aperis en la tekstoj.

Por Esperanto ni havas la sekvantajn jam elprovitajn programojn:

1) Ampleksa indekso, presita per rapidpresilo, en kiu ĉiu unuopa vortoformo bezonas unu linion. Interalie post ĉiu vortoformo estas indikitaj:

- a) numero de la paĝo, kie ĝi aperas
- b) numero de la paragrafo
- c) numero de la linio
- ĉ) interpunkciaj signoj, aperantaj post la vortoformo
- d) numero de la vorto sur la indikita paĝo.

Tia indekso estas tro granda, se oni volas ĝin publikigi, ĉar sur ĉiu elpresita paĝo trovas lokon nur 33 vortoj.

2) Densigita indekso, en kiu nur lokindikoj (paĝo, linio) estas troveblaj sub la litervico de ĉiu vorto. En unu linio estas spaco por ok tiaj indikoj, kaj krome aldoniĝas al ĉiu vortoformo ĝia absoluta aperofteco.

3) Nombrado de ĉiuj literoj de la teksto, kalkulado de iliaj relativaj oftecoj.

4) Nombrado de ĉiuj komencaj literoj.

5) Nombrado de la vortoj.

6) Statistikoj pri la ofteco de vortoj de difinita longo (en literoj).

Plue ni disponas pri programoj por laŭoftecaj vortaroj kaj rimvortaroj, sed ili estas ankoraŭ neelprovitaj. Sur trustrioj troviĝas nun la sekvantaj verkoj, por kiuj ni funkciigis la ĉi-suprajn programojn:

Ivo Lapenna, Elektitaj paroladoj kaj prelegoj, Rotterdam 1966, paĝoj 11 - 32, 113 - 130.

L. L. Zamenhof, Originala Verkaro, Leipzig 1929, paĝoj 339 - 340, 354 - 357, 360 - 381.

Mil paĝoj elpresitaj

En julio/aŭgusto ni faris unuajn kurojn, kaj fine de novembro la maŝino laboris por ni senerare kaj seninterrompe ĉ. ok horojn, pretigante la tutan materialon. Sume ni havis 25 500 vortojn kaj 125 000 literojn. Ni elpresigis entute preskaŭ mil paĝojn da grandformata komputila papero.

Montriĝis, ke la plej ofta vorto, kiel atendite, estas LA; ĝia relativa ofteco estis 7,6 % ĉe Zamenhof kaj 10,2 % ĉe Lapenna, kio montras, ke la du aŭtoroj havas tre diversajn kutimojn koncerne la uzon de la artikolo. La plej oftaj substantivoj estis "lingvo", "Esperanto", "kongreso", "mondo" kaj "homo". La supersignitaj literoj ne estas tiel oftaj, kiel kontraŭuloj de Esperanto kelkfoje asertas: ni ricevis por ili oftecon de 1,42 % ĉe ambaŭ aŭtoroj. Bedaŭrinde ni ne povas komuniki ĉi tie pro manko de spaco ĉion interesan, kion ni ekkonis pere de la komputilo, sed unu kuriozaĵo ni ankoraŭ menciis: vortoj kunmetitaj el kvar literoj estas pli maloftaj ol tiuj kun kvin aŭ eĉ pli da literoj. Precipe ĉe Lapenna tiu minimumo estas tre karakteriza.

La bona funkciado de ĉiuj programoj kaj la interesege rezultoj ricevitaj stimulis nin daŭrigi tiun ĉi laboron pri Esperanto. Sed ni reeklaboros nur tiam, kiam ni estos ricevintaj novan modernan komputilon, kiu komprenas la algoritman lingvon Fortran IV, per kiu oni povas starigi komputilajn programojn kun multe malpli da peno kompare kun nun. Krome, tiu ĉi maŝino havos multe pli grandajn kapaciton kaj rapidecon, tiel ke ni konsideras esplori tekstaron kun sume ĉ. unu miliono da vortoj (t.e. 2000 libropaĝoj).

Estontaj plibonigoj

Nia tiama celo estos aŭtomata morfologia analizo, kiu permesos listigi la diversajn vortoformojn sub unu sola baza vorto aŭ radikoj. Hodiaŭ ni devas trakti "venus" kaj "venontaj" kiel du malsamajn vortojn, sed estontece ni povos listigi ilin sub la radikoj "ven". Tiam eblos ankaŭ nombrado de difinitaj gramatikaj aĵoj, kiel akuzativo, pluralo, participoj ktp.

Nia nun havata indekso ampleksas 92 paĝojn, al kiuj povas esti aldonitaj la statistikoj pri la ofteco de literoj kaj vortoj de certa longo. Ĝi estas en tia stato, ke oni povus (fotoreprese) eldoni ĝin. Ni estas scivolemaj, ĉu post tiu ĉi informo troviĝos interesita eldonejo!



La simbolon de
la IJE kreis
franca artisto
V. Vasarely

1970 - INTERNACIA JARO DE EDUKADO

Tiun ĉi jaron Unesko, la eduka, scienca kaj kultura organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, deklaris Internacia Jaro de Edukado. Estas tute nature, ke la Esperanto-movado vaste partoprenas en tia programo, pro almenaŭ du kaŭzoj: Unue, okupiĝo pri Esperanto tute aŭtomate edukas la homon en certan direkton, al plivastiĝo de mensa horizonto kaj komprenemo por alialandaj pensmanieroj. Due, la progreso de Esperanto dependas esence de la ĉefa eduka institucio, la lernejo. Pro tiuj konsideroj la Estraro de UEA decidis meti la duan ĝeneralan kunvenon de la 55-a Universala Kongreso en Vieno sub la temon "La Internacia Lingvo kiel instrumento por eduko al internacia konceptado de la mondo". Krome, tri el la kvin temoj de la oratora konkurso de UEA traktas edukajn problemojn. Se tiuj ĉi du eroj estus la solaj kontribuoj de la Esperanto-movado al la Unesko-programo, ni farus ege malmulton. Certe lokaj kluboj kaj landaj asocioj kaj precipe la junularo mem kiel unuavica "viktimo" de edukado plej diverse kontribuos al reliefigo de moderna edukado okaze de tiu ĉi Internacia Jaro de Edukado.

☆

Inter la esperantistaj fak-organizaĵoj ĉi-rilate plej gravan rolon ludas **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)**, kiu aranĝos dum 1970 du gravajn kunvenojn en Maribor, plej norda Jugoslavio:

La 3-a Regiona Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en la Lernejojn de la 27-a ĝis 29-a de marto 1970 traktos jenan tagordon: 1. raportoj pri la ĝenerala stato de la agado kaj proponoj por komunaj aktivecoj; 2. diskuto pri eblecoj por transiro al oficialaj kontaktoj inter la koncernaj altaj lernejoj instancoj; 3. diskuto kaj kunordigo de proponoj; 4. konkludoj.

Tiun ĉi konferencon partoprenos reprezentantoj de la Landaj Asocioj kaj landaj lernejoj komisionoj el Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Italujo, kaj Jugoslavio kaj krome, laŭ invito de la Slovena Respublika Sekretariato por Kulturo kaj Klerigo, ankaŭ oficialaj delegitoj de la instruminstrejoj kaj aliaj altaj lernejoj instancoj el la supre menciitaj landoj. **Internacia Instruista Konferenco** okazos de la 28-a ĝis 31-a de julio 1970 same kiel la antaŭa en Maribor. La programo enhavas interalie asembleon de ILEI, kunvenon kun la jugoslavia instruista sindikato kaj kunsidon de verkistoj de Esperanto-lernolibroj.

Por ambaŭ konferencoj estas rezervitaj tre belaj konferencejoj kaj komfortaj ĉambroj en malmultekostaj modernaj hoteloj kaj novaj studentaj domoj, ĉio urbocentre. — Pri detaloj turnu vin al la sekretario de la organiza komitato: s-ro Ludoviko Probil, Tomanova ul. 19, Maribor.

La FRG-sekcio de ILEI invitas al studsemajno en la kastelo Schwöbber, kiu estas porinstruista domo de la kulturministerio de Malsupra Saksujo. La kunveno daŭros de la 18-a ĝis 26-a de marto 1970. Oni laboros en tri grupoj: komencantoj, progresuloj kaj studrondo; do tiu internacia kunveno prezentas bonegan okazon por instruistoj diversegrade progresintaj en la lernado kaj penetrado de la Internacia Lingvo. La ĉambroj en la kastelo Schwöbber, kiu situas proksime de la ratkaptista urbo Hameln, estas komfortaj, la manĝaĵoj bonaj. Oni pagos ĉiutage nur proks. 9,— gm. Aliĝu ĉe s-ro Heinrich Müller, Mommsenstr. 5/I, D-3 Hannover, FR Germanujo.

J. A. Komensky (Comenius) kaj lia verkaro estos la studobjekto de internacia konferenco, kiun okazigos la Muzeo de Komensky en la urbo Prerov, Ĉeĥoslovakio. Komensky, kiu postlasis al sia nacio kaj la tuta homaro ampleksekan verkaron pedagogian, filozofian kaj literaturan, kaj kiu verkis pri internacia lingvo kaj laboris en Britujo, Germanujo, Hungarujo, Nederlando, Pollando, Rusujo kaj Svedujo, meritas la nomon "instruisto de la nacioj". La konferenca urbo estas ligita al Komensky (1592-1670), ĉar tiu ĉi tie frekventis lernejon kaj laboris kiel instruisto. La programo de tiu ĉi konferenco daŭronta de la 25-a ĝis 30-a de julio 1970 enhavas plurajn prelegojn kaj diskutrodojn pri Komensky kaj kelkajn ekskursojn kaj vizitojn al lokoj ligitaj al tiu grava persono de l' eŭropa pensado. La kotizoj estas 600,— ĉeĥaj kronoj. Aliĝu ĉe: Muzeum J. A. Komenského, PhDr. Gustav Vozda, direktoro, Horní nám. c. 1, PREROV, Ĉeĥoslovakio.


Kvazaŭ antaŭŝtupoj survoje al la IJE 1970 estis diverslandaj kaj diversspecaj aktivaĵoj en pluraj eŭropaj landoj. Du regionaj konferencoj de esperantistaj instruistoj en **FR Germanujo** decidis proponi al la kulturministerioj de la 11 federaciaj ŝtatoj eksperimentan Esperantoinstruadon en sume 50 lernejoj unua-, inter- kaj duagrada. La Somera Esperanto-Universitato de Gyula, **Hungarujo**, estas ekde 1969 organizata kaj subvenciata de la Békés-Departementa Sciencopopulariga Asocio, kiu jam aranĝis dum 1969 du Esperanto-kursojn por infanoj de Gyula. Post kiam en 1968 s-ino Hegedüs estis komisiita helpi kaj kontroli la Esperanto-instruadon en la departemento Baranya, la Békés-Departementa Konsilantaro en 1969 komisiis s-ron Gyarmathy kiel oficialan inspektoron pri Esperanto-instruado. Pro tiu ofico la komisiito dum tri tagoj ĉiusemajne laboras por organizi, direkti kaj kontroli la instruadon de la Internacia Lingvo en la departemento Békés. En tiuj du departementoj Baranya kaj Békés ekzistas inter 80 kaj 90 kursoj pri la nedeviga studobjekto

Esperanto. — Meze de oktobro 1969 okazis tritaga Esperanto-ekspozicio en la Pedagogia Akademio en Petrinja, **Jugoslavio**. En 7 vitrinoj kaj sur 14 paneloj oni montris la aplikadon de la Internacia Lingvo tra la jardekoj kaj sur ĉiuj kampoj de la homa vivo. La ekspozicion vizitis pluraj centoj da lernejoj kaj aliaj urbanoj. Ekde 1969 s-ino Maria Horinek instruas al 350 lernantoj Esperanton kiel devigan studobjekton. Gravan rolon survoje al tiuj ĉi atingoj ludis la UEA-delegito de Zagreb kaj prezidanto de la Lerneja Komisiono ĉe Kroatia Esperanto-Ligo, s-ro Zvonko Rehoric.

Se fakte Esperanto havas elstaran funkcion en edukaj klopodoj, la disvastigo de la Internacia Lingvo en lernejoj devas esti akcentata tute speciale dum la Internacia Eduka Jaro. La 3-a Lerneja Konferenco de Helsinki tuj post la 54-a UK listigis plenumendajn taskojn (kp. Lernejan Bultenon, n-ro 15, en "esperanto" 10/1969, p. 158/159). Ĉiuj agantoj en Landaj Asocioj de UEA, Landaj Sekcioj de TEJO, ILEI-sekcioj, en lokaj kluboj kaj en la organoj de UEA, TEJO kaj ILEI nepre rekonsciiĝu pri tiuj taskoj kaj antaŭenpuŝu la realigon! Kaj poste bonvolu ne forgesi, ke tiu ĉi "Lerneja Bulteno" estu raportejo kaj diskutata forumo por ĉiuj aferoj koncerne instruadon.

ujm

La ekspozicio en Petrinja



Lerneja junularo

renkontiĝos

Juna gimnazia instruisto ekigis kurson en sia lernejo de Kronach, norda Bavarujo, FRG. La planoj estas ambiciaj, sed tute ne utopiaj: La gejunuloj, 14- ĝis 19-jaraj, volas tuj ekpraktiki Esperanton, unue per kolektiva korespondado, poste per individua interŝanĝo de leteroj, lumbildserioj kaj sonbendoj. La kulmino estos **internacia renkontiĝo** de la eksterlandaj gekorespondantoj kun la gelernantoj de Kronach dum junio/julio 1970. Ĉiuj lernejoj kaj individuaj tiuaguloj, kiuj serĉas translimajn kontaktojn, skribu laŭeble baldaŭ al: s-ro Arnim Grötzner, Gymnasium, D-864 Kronach, FRG. Tiaj interŝanĝoj estas esencaj kaj en la praktikado de Esperanto kaj en la internaciisma eduko. Demonstracio tiuspeca certe multe pli efikas ol plurjara teorumado pri la aplikeblecoj kaj la valoro de la Internacia Lingvo.



Kelkaj lernantoj en La Farlède atendantaj la distribuon de premioj (Foto: "République", Toulon)

Lernejoj kaj . . . ties gepatroj

En La Farlède, departemento Var, Francujo, komence de julio 1969 oni transdonis al la plej sukcesaj lernantoj de Esperanto premiojn. Tio estas nenio eksterordinara, kvankam agrabla. Menciinda tamen estas la fono: En ĉambroj de lernejoj ekde 1963 kunvenadas diligentaj geknaboj por sekvi Esperanto-kursojn, kaj . . . la gepatroj estas membroj en "Amikaro de gepatroj de Esperanto-lernantoj", sub prezidado de la urbestro. La rilatoj al lernejoj kaj aliaj eduk-instancoj estas bonegaj. La kursanoj montras konsiderindan aktivadon: multaj en- kaj eksterlandaj ekskursoj, pluraj lokaj festoj, korespondado, partopreno en "Graĵoj en vento", ekspozicioj ktp. La motoro de tiu agado estas nur "trilindro": ges-roj Mathis kaj s-ro Esteban. Antaŭ 1963 preskaŭ neniu persono en tiu regiono sciis ion pri Esperanto, kaj nun — tiel raportas regiona gazeto — apenaŭ ekzistas homo nescianta detalojn pri Esperanto. Tiu ĉi ekzemplo evidencigas, kiom da sukceso estas atingebla, se kelkaj personoj harmonie kunlaboradas kaj, sur la kampo de lerneja junularo, iel ligas la gepatrojn al la ideo de Esperanto.

KONSULTA KOMISIONO PRI LERNEJOJ

Günther Becker, Alter Hangarten 2, 6653 Blieskastel, FRG; gvidado de la komisiono; Raif Markarian, 87 Sebastian Avenue, Shenfield, Brentwood, Essex, Britujo; pedagogiaj aferoj;

Uwe Joachim Moritz, Andreasstr. 57, 5161 Merken, FRG; redaktado de la "Lerneja Bulteno", lerneja junularo;

Andrzej Pettyn, Kosciuszki 24, Milanówek (Warszawa), Pollando; instruprogramoj, lernolibroj;

Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11 a, 3161 Dollbergen, FRG; organizaj aferoj.

Se vi havas iajn demandojn, kritikojn kaj kontribuojn, bonvolu skribi rekte al la kompetentulo.

El la polvo de la tero

Recenzas Sin-itrô Kawamura (Japanujo):

El la polvo de la tero; enkonduko en la grundoscienco, de William Frederick Rolt.

La Laguna: Régulo, 1967 (1969). 134 p. Ilus. 19 cm. (Beletraj kajeroj n-ro 34).

Kiel la 63-a volumo de STAFETO aperis bonega libreto de "grundoscienco" de la nov-zelanda kemiisto, s-ro Rolt. Pri grundo mem 10 ĉapitroj el la tutaj 15 estas uzitaj. En aliaj ĉapitroj la temoj etendiĝas al plantnutrado, komercaj sterkoj, scienco pri agrikulturo, kaj la manĝaĵoj de l' homo. La fina ĉapitro temas pri "Malsata mondo serĉas manĝaĵojn".

Tial ĉi tiu libro enhavas ja ĝeneralan priskribon de agrikultura kemio de grundo ĝis manĝaĵoj de homaro. Mi dubas, ĉu ĉi tiu verko apartenas al "beletraj kajeroj". La priskribo estas science ĝusta, kvankam en la komencaj partoj la aŭtoro ŝajne volis "beletri". Ĝi estas popularscienca kajero.

Carlos Wappers



Artikoloj kaj rakontoj pri vasta temaro

Recenzas Johan Hammond Rosbach (Norvegujo):

La paperoj de Wappers, de Carlos Wappers. Buenos Aires kaj Rio de Janeiro: Argentina Esperanto-Ligo kaj Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1969. 124 p. Frontispico. 19 cm. (Libroklubo, n-ro 2).

Carlos Wappers estis klera esperantisto argentina, kiu mortis en 1964. Malgraŭ lia verkemo nur du verkoj liaj estis eldonitaj: unu franclingva pri la proporcioj de Panteono kaj unu hispanlingva pri lia laboro kiel mikroskopisto-desegnisto ĉe muzeo.

Nun oni eldonis postlasitajn paperojn. Traleginte la plejparte interesan libron, oni tamen demandas sin, ĉu ĉiuj notoj vere estis intencitaj por publikigo libroforma, ĉar kelkaj estas taŭgaj prefere por gazetoj. Cetere gramatike konscia homo kiel Wappers ne permesus publikigon de artikoloj kun gravaj eraroj (ĉefe en la komenco de la libro): kulpas la eldonintoj.

Al mi ŝajnas, ke por pli bone komprenigi laikajn legantojn, la aŭtoro devis utiligi ilustraĵojn kaj tabelojn, ekzemple por klarigi pri analizo de grundpartikloj per sinsekvaj kribiloj (p. 14) kaj selektanalizo laŭ akvofluo (p. 16), nitrogen- kaj karboncikloj (p. 39, 41), kaj klasifiko de diversaj grundoj (ĉap. 9).

La aldonitaj vortaretoj pri grundoscienco, kemiaj elementoj, rokoj kaj mineraloj estas tre utilaj. Tamen ili fariĝus pli utilaj, se ili montrus koncernajn paĝojn de la teksto, kiam tiaj troviĝas. Ekzemple, sub "humuso" aldonu "vidu paĝon 26".

Sekvas miaj opinioj pri iom da terminoj pri nutroscienco: "dieta" (ĉap. 14) estu "manĝaĵo", "dietoscienco" (p. 83) "nutroscienco", "dietero" (p. 85) "nutraĵo" (tuj sekve kaj multloke alie) "manĝaĵo", "butira, steara acido" (p. 84) "butirata, stearata acido", kaj "faboj" (p. 98) "legumenoj".

Mendu ĉe UEA: 6,48 gld. + sendokostoj 10 %.

Tion dirinte, mi devas konfesi, ke mi glutis la tutan libron, la tre kaptan artikolon pri "La interesaj formikoj", la studon pri "Forfalo de la akuzativo en latinidaj lingvoj", same kiel prelegetojn kaj rakontojn, epigramojn kaj rememorojn pri vojaĝoj. Wappers interesiĝis pri astronomio, matematiko, arto, entomologio, muziko, lingvoj. Kiam tia homo ankaŭ bone majstras Esperanton, estas ja granda plezuro legi lian verkaĵon.

Mendu ĉe UEA: prezo anoncota.

Nekrologoj

DONALD R. DUNCAN (1907-1969)

Subite mortis la 25an de decembro 1969 d-ro D.R. Duncan, en Teddington, Britujo. D-ro Duncan, konata kiel aŭtoro de la vortaro "English-Esperanto Chemical Dictionary", estis tre malnova membro de UEA kaj fak-delegito pri kemio ekde 1936. Li tradukis la libron "Amuzo per scienco".

CÉSAR ANJO (1914-1969)

Forpasis la delegito kaj FD de UEA en Viseu, Portugalujo: d-ro Augusto César Anjo. Li ĉeestis kaj salutis plurajn Universalajn Kongresojn en la lastaj jaroj kaj multe laboris por Esperanto en sia fako: pediatrio.

KOOITI ITO

Pro kancero forpasis je 26 oktobro Kooti Ito, en Yao, Japanujo, delegito kaj fak-delegito dum 15 jaroj.

HARRY FINEMAN

Harry Fineman mortis en Montrealo la 17an de novembro. En 1966 li mem eldonis sian grandan vortaron jida-Esperantan kaj Esperanta-jidan.

KRISTOFER GRIMSSON

Mortis la 13-an de novembro 1969 s-ro Kristofer Grimsson en sia 77-a jaro. Li estis aktiva en la societo en Reykjavík kaj tradukis en la islandan lingvon "Aventuroj de pioniro" de E. Privat.

Por la kosma epoko

Recenzas Dermot Quirke (Londono):

Slipara vortaro, de Rüdiger Eichholz. Cardiff, Kanado: Esperanto Press, 1969. 31, 9 p. Ilus. 22 cm. Plus nebindita sliparo, serioj 1 kaj 2.

La nuna, senprecedence rapida evoluo teknologia prezentas al ni esperantanoj neignoreblan defion. Por ke nia lingvo daŭre egaligu la naciajn, elpensendas rimedoj por ne nur ĝisdatigi, sed ankaŭ konstante unuecigi kaj stabiligi, nian vortprovizon. En mondo de komputeroj kaj spacveturado, ne plu multjare atendeblas estonta vortaro aŭtoritata. Aktualajn terminojn ni bezonas — hieraŭ!

Tial gravegas la iniciato de nia senlaca amiko Eichholz. Li eldonadas vortaron sur slipoj. Abonantoj ricevas dufoje ĉiujare po 144 terminojn, trioble presitajn, ordigotajn laŭ Esperanto, nacia lingvo kaj UDK. Tiel konstante kreskos laŭeble aktuala, 3-direkta terminaro.

Ne mankas makuloj, foje eĉ gravaj. Por kelkaj fakoj (precipe la medicina) aperas terminoj neprudente elektitaj. Sed la redakcio bonvenigas pozitivan kritikon kaj plibonigajn sugestojn. Ĝuste tial nepras, ke kiel eble plej reprezenta kunlaborantaro aktive partoprenu la projekton por ekvilibrigi, kaj laŭnecese bremsi, la ekstremojn.

Sed notindas, ke partopreno postulas tempon. Precipe en la komenco, treege tempore estas tondi, korekti kaj ordigi la slipojn. Miaopinio tamen la laboro valoras la kandelon. Ĉar ĝuste per tia sistema kunlaboro ni certigos la daŭran ekziston kaj progreson de la Internacia Lingvo en kosma epoko.

Mendu ĉe UEA: po ĉ. 3,— gld. por ĉiu serio.



Rüdiger Eichholz redaktas kaj eldonas la novan "Sliparan Vortaron", daŭre kompletigatan.

Laste aperis . . .

originala novelaro de Zora Heide, "Ni, homoj", kaj tri beletraj tradukoj: "La lando de Alvargonzalez", hispana poemo de Antonio Machado, "La fabloj", mimeografita verko de la ĉeĥa aŭtoro Ivan Hostinák, kaj "Thallusa", originale latinlingva poemo de Giovanni Pascoli. En "lu finna infanaĝo" (2,22 gld), E. Rasku rakontas pri propra juneco. La du laste menciitaj verkoj estas nur maldikaj broŝuretoj.

Grava estas la ofseta reeldono de "Gramatika demandaro resuma", 44-paĝa verko de Julio Baghy. Malgraŭ la titolo "Malgranda vortaro pola-esperanta", nova vortaro de K. Tyminski, havas 431 paĝojn. De multaj jaroj ne aperis novaj eldonoj de la konataj "Ŝlosiloj" de Esperanto en diversaj lingvoj. Sed jen aperis 2a eldono de la litova Ŝlosilo: "Esperanto raktas", de A. Poška. Kiun tudas tamen la hodiaŭ Esperanto, tiu povas amuzi sin per la fantazia "Arcaicam Esperantom" de Manuel Halvelik (123 p., ilus.).

Aliaj menciindaj broŝuretoj: "Kial mi kredas je l' islamo", de Hazrat Mirza Baŝiruddin Mahmud Ahmad (0,30 gld.), kaj modela danlingva informa broŝuro pri universitata instruado de Esperanto:

"Universitetsundervisning i Esperanto".

Tro malfrue por la novjaraj salutoj alvenis bildpoŝtkartoj el Pekino: "Blankhara knabino" (pri baledo). Sed ankoraŭ valoras akiri Esperantan kalendaron. Rekomendindaj estas "Kolora florkalendaro" kaj "Bestkalendaro", ambaŭ el Germanujo (respektive 2,20 kaj 4,40 gld.). Kalendaron 1970 eldonis ankaŭ ĈEL, kaj el Hanojo aperis eĉ "Centjara kalendaro".

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Ĉe novaj eldonaĵoj ne ĉiam eblas tuj indiki la prezon en guldenoj. Al ĉiuj prezoj aldoniĝas 10 % por sendokostoj.

Alvoko

Por verki biografion pri LANTI mi bezonas ĉiajn dokumentojn pri kaj de li. Al ĉiuj, kiuj posedas tekstojn, leterojn, fotojn aŭ povas doni aliajn informojn pri lia vivo, mi sincere petas skribi al mi.

E. Borsboom, Klipspringerdreef 23, Utrecht, Nederlando. Tel. 030-446674

LOKE - FAKE - PERSONE



D-ro Eduard Macheiner, nova ĉef-episkopo de Salzburg (vidu: Persone)

LOKE

Britujo

- La ŝtate subvenciata institucio British Council, kies buĝeto de £ 12 milionoj servas unuavice por disvastigi la anglan lingvon, rekonas en sia jar-raporto ĵus aperinta, ke la angla kiel dua lingvo komencas disfali en kelkaj landoj, simile kiel la latina disfalis en Eŭropo.

Bulgarujo

- La plej altan ŝtatan ordenon "Georgi Dimitrov" ricevis la prezidanto de BEA, s-ro Nikola Aleksiev, okaze de sia 60-jariĝo kaj rekone al lia agado i.a. por Esperanto. Aliajn ordenojn ricevis, same pro Esperanto, s-roj N. Kuĉukov, I. Keremidĉiev kaj K. Vâlev. La revuo "Bulgara Esperantisto" estis distingita per ordeno "Kiril kaj Metodij" okaze de sia 50-jara aperado.

Ĉeĥoslovakujo

- La du novaj landaj asocioj en la ĉeĥa kaj slovaka respublikoj kreis al si je la 20a de decembro superan, tutlandan organon: Ĉeĥoslovakia Esperanto-Federacio (ĈSEF). Prezidanto de ĈSEF fariĝis s-ro Josef Vítek. Ĝia adreso: Blanická 4, Praha 2.

Eŭropo

- Laŭ la germana gazeto "Der Spiegel", Francujo postulos oficialigon de la franca lingvo kiel sola labora lingvo de la eŭropaj komunumoj, antaŭ ol akcepti Britujon kiel membron de la EEK. Nuntempe la franca estas nur unu el kvar oficialaj lingvoj, apud la germana, itala kaj nederlanda. Sed la akcepto de Britujo signifus malfermi la pordon al la influo de la angla lingvo.

- Raporto de la Politika Komitato de la Eŭropa Parlamento atentigas pri la lingva problemo en la universitatoj de la EEK-landoj. "En multaj fakoj la universitatoj eĉ ideon ne havas pri la scienca evoluo en najbaraj landoj. Multaj germanaj kaj francaj sciencistoj tute ne scias, kio okazas en Italujo kaj Nederlando. "La raporto rekomendas, ke ĉiuj 4 oficialaj lingvoj de la EEK estu instruataj en ĉiuj universitatoj de la 6 landoj. Ĝi tamen ne konjektas, kiom da lingvoj necesus instrui, se la EEK plivastiĝus per aliĝo de aliaj landoj.

Francujo.

- Ekde 1969-70 la Universitato de Clermont-Ferrand enkondukis Esperanton en la filozofia-filologia fakultato kiel nedevigan sed ekzamenan studobjekton por la unua studjaro. Ĝi estas la sola universitato franca, kiu rekonas Esperanton kiel ekzamenan fakon. Instruas al pli ol 70 studentoj prof. d-ro Pierre Janton.

Japanujo

- Vizitantoj al la Mond-ekspozicio EXPO 70 en Osaka, Japanujo, povos profiti la okazon ĉeesti ankaŭ la 57an Kongreson de Japanaj Esperantistoj, okazontan en la sama urbo en la 25a kaj 26a de julio. La Ekspozicio daŭras de la 15a de marto ĝis la 13a de septembro.

Rumanujo

- La 7an de decembro la bukureŝta esperantistaro ricevis oficialan aprobon por klubejo kaj kursejo en kvartala kulturdomo: Casa de Cultura Sector 6, Bukureŝti, Calea Rahovei Nr. 151.

Usono

- La 2an de decembro parolis James J. Delaney en la Ĉambro de Reprezentantoj pri la kosto de tradukado kaj interpretado ĉe UN (laŭ taksoj, ĉ. 10 % de ĝia buĝeto) kaj pri la ŝparoj, kiujn ebligis la uzo de Esperanto.

- Daŭrigante sian inform-kampanjon prepare al la Universala Kongreso en 1972, Esperanto-Inform-Centro de ELNA distribuis al bibliotekoj pliajn 11 000 ekz. de la broŝuro "Wanted: a World Language" de Mario Pei. Sekvos prelegvojaĝoj al universitatoj.

FAKE

Fotografio

- La ekspozicio "Fotosalon Vítkovice 70" eldonis sian prospekton en la ĉeĥa, rusa, angla, franca, germana kaj Esperanto. Interesitoj konkursi skribu al: Fotosalon Vítkovice 70, Dum kultury VZKG, Ostrava, Ĉeĥoslovakujo.

Literaturo

- La unuan kaj duan premiojn en la ĉi-jara konkurso Comella-Bassols (pri la plej gaja originala rakonto en Esperanto) gajnis Teo Jung (Nederlando) kaj Jan Filip (Ĉeĥoslovakujo) respektive.

Mond-civitanoj

● En la kadro de la jara asembleo de Mond-civitanoj kaj de Kongreso de la Popoloj, okazis la 15an de novembro unuafoje aparta kunsido de mondcivitanoj-esperantistoj. Pri la movado informas s-ino R. Volpelière, 10, rue de la Servie, F-30 Nîmes, Francujo.

Sonbend-amatoroj

● Kiuj deziras interŝanĝi sonbendojn en Esperanto, povas senpage aperigi anoncetojn en la gazeto "AGFA-Magneton-Illustrierte", s-ro Glatten, D-509 Leverkusen/Bayerwerk, Germanujo.

PERSONE

Harabaĝiu

● Surŝipajn kursojn (sur "Donizetti" kaj "Iberia") gvidis lastatempe, traveturante Pacifikon kaj Atlantikon, s-ino G. Harabaĝiu el Kalifornio. Dum halto en Kurasao intervjuis ŝin televido loka.

Macheiner

● D-ro Eduard Macheiner, membro de la Honora Komitato de la UK Vieno, estis laste nomita Ĉefepiskopo de Salzburg, Aŭstrujo. D-ro Macheiner lernis Esperanton jam kiel gimnaziano kaj estas i.a. prezidanto de la papa komisiono por kunordigo de liturgiaj Esperanto-tekstoj.

Nevan

● Trilingva fariĝos la ĵusnaskita (21 jan. 70) Nicol Nevan, filino de KKS Mikulás kaj KKS-edzino Jaroslava Nevan. Al la denaskaj ĉeĥa lingvo kaj Esperanto sendube aldoniĝos per si mem la (roterdama) nederlanda. Al la gepatroj niajn plej varmajn gratulojn kaj bondezirojn!

Ekzamenigu vin!

La Internacia Ekzamena Komisiono denove ekzamenos kandidatojn en Vieno okaze de la UK. Povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomiĝo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi kiel eble plej frue (limdato la 1-a de majo) al la Sekretario de la IEK (S-ro J. C. Wells, 17, Ashbourne Terrace, London S.W. 19, Britujo): esperantlingvan tradukon de la diplomo pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas 7,20 gld. aŭ egalvaloro, kaj devas esti pagita samtempe. Por kandidato, kiu pro registaraj reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, ekzistas ebleco de speciala aranĝo.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas "atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo". Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diplomo. Detala regularo kaj listo de rekomendita literaturo estas ricevebla de la Sekretario de la IEK aŭ de la C.O. de UEA.



55a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Vieno, 1 - 8 aŭgusto 1970

Alta protektanto: Franz Jonas, Prezidanto de Aŭstrujo.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Aktuala diskut-temo

"Konflikto de generacioj: ĉu realaĵo aŭ preteksto?" estos la temo de la ĉi-jara kongresa debato. Kiu partoprenis tiun ĉi viglan programeron en Helsinko, certe ne preterlasos la okazon ĉeesti ĝin en Vieno. La debato donos eblecon al kiu ajn kongresano esprimi sian vidpunkton.

Oficiala Bankedo

Specife vienan karakteron havos ĉi-jare la oficiala bankedo. Ĝi okazos en luksa "Kursalon", situanta en la urbocentro. La abunda menuo konsistos el aŭstraj specialaĵoj kaj kontentigos eĉ frandemulojn. La detaloj kun mendilo aperas en la Dua Bulteno. Fiksita prezo: 25,— gld.

Fakaj kunsidoj

Entute jam 23 fakaj organizaĵoj aligintaj aŭ kunlaborantaj kun UEA mendis fakkunsidojn enkadre de la 55-a UK. Multaj el ili, ekzemple juristoj, fervojistoj, instruistoj, ornitologoj k.a., aranĝos sian kunvenon publike, t.e. kun ĉeesto de samfakaj specialistoj-neesperantistoj. Jen certe unu el la plej taŭgaj informaj agadoj.

Neoficialaj ekskursoj

Profitante la favoran geografian distancon kaj la eblan emon de la kongresanoj viziti unu el la najbaraj ĉefurboj, la LKK interkonsentis kun la Aŭstra Vojaĝoficejo vizitojn al Praha kaj Budapeŝto post la UK en Vieno. La interkonsento inkluzivas facilan vizoaranĝon kaj esperantlingvan gvidadon dum la tuta ekskursita tempo. Detalojn legos ĉiu kongresaliĝinto en la Dua Bulteno.

Nova karavano

Flugvojaĝon al Vieno ĵus anoncis hispanaj esperantistoj kunlabore kun Swissair kaj la vojaĝagentejo Meliá. Meliá eldonos ankaŭ koncernan faldfolion. Antaŭvidataj estas krome grupvojaĝoj el Jugoslavio kaj Bulgarujo.

Statistiko (12.1.1970)

Alĝerio 2, Arg. 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 62, Belgujo 11, Brazilo 1, Brit. 52, Bulg. 30, Ĉeĥoslov. 10, Danlando 19, Finnlando 33, Francujo 118, Gano 1, Germ. 69, Grek. 4, Hisp. 21, Hung. 12, Indonezio 1, Irlando 1, Israelo 7, Italujo 25, Japanujo 12, Jugoslav. 11, Kanado 5, Meksiko 1, Nederl. 75, Norveg. 6, Nov-Zel. 1, Pollando 39, Portug. 1, Rumanujo 1, Sud-Afriko 1, Svedujo 68, Svisujo 19, UAR 2, Urugvajo 2, Usono 23. Entute 750 aliĝintoj el 37 landoj.

Kurso en la franca radio



FRANCA RADIO. La radiostacio en Clermont-Ferrand dissendas kurson ĉiuvendre de 18.30 ĝis 19.00 (G.M.T.), escepte dum la studenta ferio-tempo. Ondo uzata: 90.4 Mcs (modulata frekvenco). Stacio nur loke aŭdebla. Aŭskultantoj bonvolu manifesti sian intereson pri tiu kurso per leteroj franclingvaj al la direktoro de "Centre de Télé-enseignement de la Faculté des Lettres", 29 bd. Gergovia, 63-Clermont-Ferrand.

POLA RADIO. Jen la kadra programo de la elsendoj, kies horaro aperis en la januara tabelo:

1) matena programo

— lunde, pollandaj temoj, trarigardo de Esperanto-revuoj, "Esperanto-Ekspreso".

— marde, komentario, scienca tribuno (unuan kaj trian mardon), pollandaj temoj;

— merkrede, komentario aŭ pollandaj temoj, ripetu de unu el la mardaj posttagmezaj magazinoj;

— ĵaŭde, komentario aŭ pollandaj temoj;

— vendrede, komentario aŭ pollandaj temoj aŭ priesperanta felietono, leterkesto;

— sabate, komentario aŭ noto de la tago, literatura aŭ kultura programo;

— dimanĉe, la pola Esperanto-movado, la

semajno en Pollando.

2) posttagmeza programo

— lunde, komentario aŭ noto de la tago, koncerto kun bondeziroj;

— marde, junulara magazino, film-magazino, "Aŭskultantoj petas — ni disaŭdigas";

— merkrede, "Pri kio oni parolas en Pollando?", anguleto de nevidantaj esperantistoj, (la unuan merkredon de la monato), "Por la progresantaj esperantistoj", virina rubriko;

— ĵaŭde, komentario aŭ noto de la tago, leterkesto;

— vendrede, literatura aŭ kultura programo;

— sabate, la semajno en Pollando;

— dimanĉe, panoramo de internaciaj eventoj, "Esperanto-Ekspreso."

Krome, ĉiutage escepte dimanĉojn, dum la posttagmeza elsendo, novaĵoj de la "radio-ĵurnalo".

Detala programfolio kun informoj por partopreni la konkursojn kaj la "koncertojn kun bondeziroj" estas senpage havebla de Pola Radio, Esperanto-programo, Varsovio, Pollando.

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la januaran eldonon.

En tio ĉiu povas helpi!

Jam de multaj jaroj, unuopaj membroj de UEA kaj lokaj grupoj tra la mondo kolektas uzitajn poŝtmarkojn por la Asocio. Per la disvendo de tiuj poŝtmarkoj UEA sukcesas enspezi ĉiujare gravan sumon por la ĝenerala kaso.

En 1969 kontribuis entute 80 personoj kaj grupoj en 23 landoj. Grava kontribuo, jes — kaj ĝia financa rezulto en 1969 estis aparte kontentiga. Sed komparu nur momenton tiun nombron kun la pli ol 30 000 membroj de UEA! Ĉu eble vi povus ankaŭ kontribui? Per la fortonditaj poŝtmarkoj de sur viaj korespondaĵoj? Per malnovaj kolektoj kuŝantaj ie en tirkesto? Eĉ per poŝtfreŝaj serioj speciale aĉetitaj, se vi deziras donaci al UEA sed loĝas en lando, kiu ne permesas transpigi al Rotterdam? Kelkaj personoj en tiaj landoj jam sukcesis per tiu rimedo pagi kotizon, librojn aĉeti, ktp. Unu eĉ sukcesis fariĝi dumviva membro per pago poŝtmarka!

Ĉiujn poŝtmarkojn sendu nur al jena adreso: Peter Zacho, Aamosevej 5 A, DK 2700 Brønshøj, Kopenhago, Danujo.

En 1969 la plej gravaj kontribuantoj estis:

- 1) S-ino Anna Wedholm, Uppsala, Svedujo;
- 2) Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (s-inoj Aagaard kaj Canty);
- 3) S-ino Ann Sara Estling, Portland, Oregon, U.S.;
- 4) Esperanto-klubo Portland, U.S. (s-ino Mikkelsen);
- 5) S-ino Ernest H. Franseen, Seattle, Usono.

Dankon kaj gratulon al ĉiuj menciitaj, kiel ankaŭ al Oomoto, Japanujo, kiu egalas al la usonaj kontribuantoj, sed jam plurfoje ricevis premieton. Kaj anticipan dankon al ĉiuj novaj kolektantoj en 1970!

HINDA UNIO

Skribas Probal Daŝgupto (Kolkata):

Ne estante fanatikulo kontraŭ la uzo de -i- anstataŭ -uj- por landonomoj, mi volus atentigi, ke ekzistas tre valida kaŭzo, pro kiu la formo "Hindio" por la Hinda Unio devus esti anatemita. Estas ĉi-lande uzataj, laŭ la popolnombro en 1961, 225 lingvoj. Nur unu el ili nomiĝas la "hindia" lingvo. Kvankam la Konstitucio elektis ĝin la tutnacia lingvo, tamen nur ĉ. 35 % de la hindoj plene posedas la hindian, kiu do ne estas la sola hinduja lingvo. Do simple por eviti homonimecon tian, kia povus forpuŝi hindojn for de Esperanto, estus preferinde uzi sole nur la formon "Hindujo". La subskribinto volas substreki, ke li nenion havas kontraŭ "Bengalia", "Ĉinio", "Japanio" k.s.

Efikoj de agado Behrmann

Skribas J. Kondor (Germanujo):

Mi mem havas jam tri kajerojn kaj tri sondiskojn de s-ro Behrmann, kaj ĉiuj ege plaĉas al mi. Laŭ mia opinio lia agado por Esperanto estas unika en la mondo kaj... imitinda! En Germanujo (kaj ankaŭ en nia lernejo!) jam ekinteresiĝis la homoj pri Esperanto, dank' al la aktiva agado de s-ro Behrmann.

Interparolas Agnes (Belgujo), Anna (Britujo), Paul (Belgujo) kaj Wim (Nederlando) pri la Seminario de GEJ en Marburg.

Wim: "Kelkajn vortojn pri la junulargastejo, mi petas". "La knabinaj dormoĉambroj estis vere komfortaj," rimarkigas Agnes, "kaj kutime regis trankvilo, se ni flankelasas la berlinan fantomon". Serioza kontribuo de Anna: "malsufiĉis lumo por legi en la lito." Sekvas maliceta reago de Paul, kiun ni cenzuras. Wim: "mi ŝatus aldoni, ke la knabaj dormejoj estis tro etaj por po 16 personoj, sed ni transiru al pli seriozaj aferoj. Al vi, Paul, mi direktas la sekvantan demandon, ĉar vi ĉeestis la prelegon de Peeraerts ('humuro en la E-literaturo'). Kiaj motivoj gvidis vin, kiam vi elektis la citaĵojn?" Paul: "persona prefero; la fakto, ke ekz. Schwartz mi apenaŭ citis, ŝuldiĝas al tio, ke mi ne jam havis la okazon funde studi liajn verkojn." Wim: "por mi estis la dua fojo, ke mi aŭdis vian prelegon, kaj mi ĝoje konstatas, ke ree la publiko tre aprezis ĝin. Sed Anna, ĉu vi ĵus menciis la unuan prelegon de Maas, tiun pri komputila analizo de literaturo?" Anna: "jes, tre interesa, vere informriĉa; mi havis bonan diskuton kun li." Wim: "vere atentokapta estis ankaŭ lia dua prelego ('aŭtomata pritrakto de tekstoj'). Min trafis la rezultoj de la statistikaj esploroj, ke el la 6 plej raraj E-literoj estas 4 supersignitaj kaj la z, kion mi ne sukcesas akordigi kun la kelkfoja kvazaŭ-akuzo, ke Esperanto havas iel tro slavan aspekton. Alia demando: "ĉu imponis la prelegoj de prof. Milisavaĉ ('ĉefaj tendencoj en nuntempa jugoslavia literaturo' kaj 'la poezio de la junaj koleraj homoj')?" Ĥore: "ne, traktu alian temon." "Bone, do kion diri pri la surbenda kontribuo de Simonnet ('malpredikanta teatro: Beckett kaj Ionesco')?" Oni komune hontas, ĉar neniu ĉeestis. "Kaj fine prof. Lapenna. Ĉu vi samopinias kun mi, ke lia unua prelego ('ĉu modernaj literaturaj tendencoj speguliĝas en la E-literaturo?') estis teda ripetado de ĝenerale konendaj faktoj?" Unuanima kapjesado. "Sed feliĉe la dua ('fundamentaj principoj de oratora arto') brilis laŭ mi." Paul: "absolute; nenio aldoninda. Mi ĝuis ĝin, kaj ĉiu kun mi." Wim: "ni lasu la seriozajn aspektojn kaj turnu nin al alia temo, ekz. la manĝoj. Ekkrio de Anna: "vespermanĝo terura!" "Konsentite, sed cetere nenio kaŭzo por serioza plendo." Ŝajne inspira temo, ĉar eksonas korko de botelo, kaj paŭzas intervjuo(n)toj. Wim: "nun iom pri la silvestra balo." Anna: "bonegaj diskoj, escepte de la germanaj; alloga dancejo." Agnes: "maltro da spaco por tro da homoj." Wim: "interese, ke dum la tuta semajno floris la kajmanismo, pleje dum la balo, tiom ke spontanee fondiĝis la "Sociedad de los Amigos de Espana, Portugal y Latin-America", kies aliĝo al UEA kiel faka asocio estas konsiderata. Sed nun mi volas aŭdi finrimarkojn, ĉar devas resti spaco por kelkaj fotoj, kaj ni jam tro



Adiaŭo en la stacidomo de Marburg; la bildo prezentas partoprenintojn el Belgujo, Britujo kaj Italujo.

parolas." El la lavango da respondoj montriĝas, ke la seminarion karakterizis

- daŭre insidanta gripo kaj floranta negocado de medikamentoj
- foresto de antaŭe tiel kutima klikismo kaj ceesto de novaj vizaĝoj, eĉ kelkaj programitaj
- bonega etoso, kiun nia norvega amiko Otto Prytz trafe priskribis per limeriko, kiu, ho ve, perdiĝis en trinkejo.

Wim: "dankon, sufiĉas. Mi fine aldonu, ke se la lingvaĵo de ĉi rakonto estas kelkloke iom kriptata, tio povas esti rigardata nur kiel nepra instigo partopreni la sekvantan, 14-an Internacian Seminarion de Germana Esperanto-Junularo."

AŬGUSTO 70: TEJO, GRAZ, LERNEJOJ.

Jen la ŝlosilaj vortoj de la 26-a IJK de TEJO, kiu okazos en la aŭstra Graz, kaj pri kiu aperis la Unua Bulteno. "Lernejo, ejo de la revolucio?" Ĉi-supra estas la kerna demando de la ĉi-jara IJK, mem traktota en la unua baza prelego kaj diskuto el serio de ses tiaj prelegoj kun grupaj diskutoj, ĉiuj sub la temo "Junularo kaj lernejo". Per detala analizo de ĉi kadra temo TEJO volas iri pluan paŝon sur la vojo elektita en Tyresö.

Sed man-en-mane kun seriozo marŝos distro kaj publika diskonigo de la kongreso. Por komenci per tio lasta: gazetara konferenco kaj foruma diskuto en la universitato. Rilate amuzajojn: interkona vespero, teatra, literatura, latinamerika kaj subgrunda (!) vesperoj, balo, manifestacio, ktp. Vere mankas spaco por daŭrigi en ĉi tiu artikoleto.

Sed kial ne mem peti la Unuan Bultenon kaj aliĝilon ĉe: 26-a Internacia Jun. Kongreso, Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz, Aŭstrujo.

Detaloj pri la 26-a IJK aperos en la marta numero!

KALENDARO POR FEBRUARO - AŬGUSTO

- Februaro**
22-28 Semajno de Internacia Amikeco
- Marto**
7 Internacia Renkontiĝo, Leipzig, Ger.
22-4/4 Studoj kaj pedagogio, Grésillon, Fra.
27-29 3a Regiona Kunordiga Konf. por Enkonduko de Esp. en la Lernejojn, Maribor, Jug.
27-31 Trilanda (Bel., Ger., Ned.) Kong., Aachen
27-4/4 Int. Junulara Renkontiĝo, Aachen, Ger.
31 Limdato de la belartaj konkursoj
31 Kotizoj Universala Kongreso altiĝas
- Majo**
1 Limdato por Internacia Ekzameno
15-19 2a Renkontiĝo Franca-Monaka-Itala, 62a Franca Kong., Monte-Carlo, Monako
16-18 Sveda Kongreso, Jönköping
16-22 22a Int. Fervojista Kong., Rimini, Ita.
22-25 54a Brita Kongreso, Harrogate
- Junio**
21 Limdato por aliĝo al UK Vieno
27-29 2a Franca-Hispana Renkontiĝo, Jaca, His.
28-12/7 Seminario por kursgvidantoj, Grésillon
- Julio**
4-12 10a E-ista Renkontiĝo, Podebrady, Ĉeĥ.
5-11 8a Somera Esp.-Universitato, Gyula, Hun.
12-26 Kulturaj-turismaj ferioj, Grésillon
15-25 Int. Turista Renkontiĝo, Szeged, Hun.
18-28 3a Int. Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hun.
19-26 FERIAJ Esperanto-kursoj, Helsingör
- 
- 22-26 Usona Kongreso, San Francisko
24-31 2a Kong. de Kristanoj kaj Katolikoj, Brno
25-26 57a Japana Kongreso, Osaka
25-30 Int. Konf. pri J. A. Komensky, Prerov, Ĉeĥ.
25-31 43a SAT-Kongreso, Augsburg, Ger.
26-9/8 Esperantaj studoj, Grésillon
28-31 Instruista Int. Konferenco, Maribor, Jug.
29-1/8 Antaŭkongreso de 55a UK, Bratislava, Ĉeĥ.
- Aŭgusto**
1-7 Int. Feriosemajno (TANEF) en Nigra Arbaro, Ger.
1-8 55a Universala Kongreso, Vieno, Aŭstrujo
8-10 Postkongreso de 55a UK, Linz, Aŭstrujo
8-15 26a Int. Junulara Kong., Graz, Aŭstrujo
„ Postkongresa ekskurso al Bad Hofgastein, Aŭstrujo
9-11 Postkongresaj ekskursoj al Praha, Ĉeĥ, kaj al Budapeŝto, Hun.
9-14 Postkongresa ekskurso tra Aŭstrujo
9-30 Kulturaj semajnoj en Grésillon

Kreskis la asocia

Oficiala informilo 431, 1 jan. 1970

La jarfina statistiko pri la membraro de UEA en 1969 montras bonvenan kreskon de la nombro de Asociaj Membroj: de 24 853 al 26 319. Tio spegulas bonan progreson ĉe pluraj landaj asocioj, precipe la aŭstralia, la dana, la hungara, la itala, la pola kaj la usona. Konsekvence, kreskis ankaŭ la entuta membro-nombro de UEA, ĉar la nombro de individuaj membroj restis stabila. La sumo de 33 407 estas pli alta, ol en kiu ajn antaŭa jaro, kun la sola escepto de 1963. Sed, ĉar ankoraŭ mankas kelkaj antaŭvideblaj pagoj, preskaŭ certe la definitiva nombro estos nova rekordo, superanta eĉ 1963.

La nombro de individuaj membroj estas ne-kontentiga. Kvankam la malkresko de 1968 al 1969 estas nur 7, kiu ajn malkresko estas bedaŭrinda. Tamen kreskis — per ĉ. 40 — la membraro en tiuj kategorioj, kiuj ricevas la revuon "Esperanto", dum precipe malkreskis tiuj, kiuj ricevas nur la Jarlibron. Ankaŭ la statistiko pri individuaj membroj ankoraŭ ne estas definitiva, ĉar ĉiujare alvenas pagoj ankaŭ post la jarfino. La finaj ciferoj aperos en la marta numero.

	1968	1969
Asociaj Membroj:	24.853	26.319
Individuaj Membroj -		
MJ	837	798
MA	4.824	4.853
MS	286	272
DM, D.Pat.	741	809
HM, H. Prez.	28	26
J-MJ	50	42
J-MA	182	145
MA-K	147	143
Individuaj entute:	7.095	7.088
Membroj entute:	31.948	33.407

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de aprilo neniu membro protestas pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Aŭstralio: Douglas Thorp (FD), Perth. **Germanujo:** Helmut Klünder, Burgsteinfurt. **Norvegujo:** Sonja Jørgensen (FD), Trondheim. **Usono:** Margaret Schneider, San Antonio, Texas.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1969)

Franco: Epinal (D); Privas. **Germanujo:** Karlsruhe (FD socia asekuro); Köln (JD); Würzburg (FD sonbendoj). **Hispanujo:** Zaragoza (FD medicino). **Nederlando:** Dordrecht (VD). **Portugalujo:** Viseu. **Svislando:** Wil.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Baker, s-ro Crawford, Fielding, Sask., Kanado. Bigelow, f-ino Marion, Fresno, Calif., Usono. Boddy, s-ro A. H., Dar es Salaam, Tanzanio.

Bosscher, f-ino A. I. H., Danderyd, Svedujo.
 Boyet, s-ro F., Angers, Francujo.
 Bühlmann, s-ro Davide, Lausanne, Svislando.
 Chaumereuil, s-ino Gisèle, Tananarive, Madagaskaro.
 Dijkhoff-Lenze, s-ino I. M. J., Den Haag, Nederlando.
 Gibson, s-ino Ella, Palo Alto, Calif., Usono.
 Granqvist, s-ro Börje, Helsinki, Finnlando.
 Gustavsson, s-ro Gunnar, Halmstad, Svedujo.
 van Iperen de Vries, s-ino N., Utrecht, Nederlando.
 Jakobson, f-ino Ulla, Kaskinen, Finnlando.
 Kappert, f-ino B., Amsterdam, Nederlando.
 de Kat, s-ro J. O., Den Haag, Nederlando.
 Kliphuis, f-ino B. F., Hoogezand, Nederlando.
 Pena, s-ro Antonio, Berazategui, Argentino.
 Perko, d-ro K., Graz, Aŭstrujo.
 Poumureau, s-ro Edmond, Segonzac, Francujo.
 Schmidt, pastro A., Innsbruck, Aŭstrujo.
 Stoor, s-ino Brita, Övermalax, Finnlando.
 Vazquez, s-ro J., West Orange, N.J., Usono.
 Wermelinger, s-ro, Buhl, Francujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1970

31 Hubalek, s-ro J., Aŭstrujo. 32 Atkinson, s-ro G. B.; 33 Atkinson, s-ro W. G.; 34. Bellatti, s-ro S. E.; 35 Kennedy, s-ro D.; 36 Kennedy, s-ino M.; 37 Sly, s-ro K. A., Britujo. 38 Blume, s-ro A.; 39 Hou, s-ro C. H.; 40 Jahn, s-ro C. J.; 41 Jenssen, s-ro J. P.; 42 Kolle, s-ro A.; 43 Pedersen, s-ro J.; 44 Piotrowski, s-ro S.; 45 Trier, s-ro B. S., Danlando. 46 Larglantier, s-ro G., Francujo. 47 Grundhoff, s-ro J.; 48 Schütt, s-ro H.; 49 Teltz, s-ro F.; 50 Wagner, s-ro H.; 51 Wehrheim, d-ro H., Germanujo. 52 Dijkstra, s-ro J. W.; 53 Laverman, f-ino A. A.; 54 Mast, s-ro J. L.; 55 Peet, s-ro G. M.; 56 Ponti, s-ro D.; 57 Postma, f-ino Tj., Nederlando. 58 Børresen, s-ro O.; 59 Maarli, s-ro E., Norvegujo. 60 Grutter, s-ino L., Svislando. 61 Feeney, s-ro R.; 62 Neri, s-ro R. R., Usono.

DONACOI (Gld.)

Fondaĵo Azio-Afriko: (por Konga Esperanto-Instituto), Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 50,—.

Fondaĵo Canuto (Por membri personojn en landoj kun transpagaj problemoj): Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 25,—; Muller, s-ro J. L., 1 MJ.

Fondaĵo Enciklopedio de Esperanto: Germanujo: Murath, s-ro M., 17,06; Nissen, s-ro K., 21,45; Thalmaier, s-ro L., 2,93.

Ĝenerala kaso: Germanujo: Bormann, d-ro A., 2,93. Hispanujo: Arnella Mas Masot, s-ro, 20,80; N.N., 13,50. Nederlando: Beekhuysen, s-ro B. R., 20,50. Svedujo: Anderson, s-ro G., 34,73.

Patrono A de TEJO: Britujo: Parson, f-ino E. L., Francujo: Lavarenne, s-ro; Tavernier, s-ro; Vincent, s-ino. Germanujo: Becker, s-ro G.; Peine, s-ro O. Nederlando: Moerbeek, s-ro R. Svedujo: Nordström, s-ro R. (ankaŭ por 1969). Usono: Neri, s-ro R. R.

Por TEJO: Germanujo: Peine, s-ro O., 12,27. Usono: Neri, s-ro R. R., 2,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

Rezulto de la Internaciaj Konkursoj 1969

Konkurso I

Pozicio	lando	kvoto	poentoj	%
1	(1) Finnlando	2401	3400	141,61
2	(2) Usono	4022	4675	116,24
3	(3) Italujo	3737	4060	108,64
4	(4) Danlando	2648	2790	105,36
5	(7) Britujo	5835	5855	100,34
6	(6) Svedujo	6192	6200	100,13
7	(5) Jugoslavio	3643	3640	99,92
8	(8) Nederlando	5110	5075	99,32
9	(9) Japanujo	3837	3715	96,82
10	(11) Svislando	1775	1605	90,42
11	(10) Germanujo	6257	5630	89,98
12	(15) Belgujo	1836	1645	89,60
13	(12) Francujo	6887	5960	86,54
14	(13) Hispanujo	2879	2375	82,49
15	(14) Brazilo	2950	2058	69,76

Konkurso II

1	(1) Grekujo	288	456	158,33
2	(2) Aŭstralio	1275	1610	126,27
3	(3) Israelo	524	525	100,19
4	(6) Kanado	1103	1104	100,09
5	(5) Aŭstrujo	1231	1230	99,92
6	(4) Nov-Zelando	1171	1127	96,24
7	(8) Norvegujo	1343	1235	91,96
8	(7) Argentino	650	592	91,08
9	(9) Sudafriko	250	185	74,—
10	(10) Madagaskaro	250	170	68,—
11	(11) Islando	250	95	38,—

Varman gratulon al la varbantoj kaj perantoj de kotizoj en Finnlando kaj Grekujo! Aparte aplaŭdinda estas la venko de Grekujo, kiu tiel venkis tri jarojn sinsekve. Laŭdon ankaŭ al Usono kaj Aŭstralio, kie la movadoj tre vigliĝis en la lastaj jaroj. La kotizperanto de la venkinta lando en iu el la du konkursoj ricevas je sia dispoŝo libro-premion de 100,— gld.

Laŭ decido de la Estraro de UEA, la konkursoj 1969 estos provizore la lastaj. Ekde 1970 ni aplikos aliajn metodojn por stimuli la varbadon de membroj.

LA VIC-PREZIDANTO DE UEA

s-ro E. L. M. Wensing pro malsano estas devigita rezigni ĉiun agadon dum minimume 2 monatoj. Li petas ĉiujn, kiuj skribis al li dum la lastaj monatoj, kaj al kiuj li pli frue ne povis respondi pro daŭra vojaĝado, plue pacienci ĝis lia resaniĝo. Ni deziras al s-ro Wensing kompletan kaj baldaŭan refortiĝon.

DANKON !

Al ĉiuj membroj kaj kunlaborantoj, kiuj okaze de la jarfinaj festotagoj sendis al la Centra Oficejo en Rotterdam aŭ al aliaj oficejoj de UEA salutojn kaj bondezirojn, ni diras ĉi tie publikan dankon. Estu la nova jaro 1970 por ĉiuj sukcesoplena kaj feliĉiga!

Anoncetoj

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.



Ahmed Hussain Maa'tuk, kun fratinoj

Mi aĉetas aŭ interŝanĝas malnovajn Esperanto-librojn. Bonvolu skribi al s-ro Ramón Molera, Sta Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Esperanto-poeto Danielo Kolker deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Sendos kontraŭ 100 uzitaj poŝtmarkoj aŭtografon de sia versaĵo. Str. Ĉumaĉenko 15-41, Zaporozĵje-58, Ukrainujo, Sovetunio.

Karaj legantoj! Ni devas instigi al la esperantistaro priatenti radioamatorismon. Nia varbad-slogano:

Radioamatorismo + Esperanto = Progreso

Kiel presaĵoj, tiel la radioamatorismo estas nepre necesa informilo de moderna esperantistaro. Bonvolu tuj skribi al d-ro Anton Huemer/OE 5 HML, A-4360 Grein, Aŭstrujo.

Villa "Tabou", Helene Stoffers, Supercassis 47, F-13-Cassis, Francujo. Migdalarboj kaj mimozoj baldaŭ floros en mia ĝardeno. "Tabou" staras apud la Blua Maro, 20 km oriente de Marseille. Mi ludonas ĉambrojn (varma fluanta akvo) kaj apartan kuirejon, kie vi povus fari vian tutan manĝaĵon. Venu! Mi parolas Esperanton, germane kaj iomete france.

S-ro Antonio M. de Castro, Aparici y Guijarro 59, Tarrasa, Hispanujo, korespondas per il. pktoj.

Mankas al mi antaŭmilitaj numeroj de Vojo Vero Vivo. Kiu povos helpi? R. Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Literatura Mondo. Mi volas vendi miajn nebinditajn, kompletajn jarkolektojn de ĉi tiu bela kaj luksa revuo, inkluzive la suplementojn Lingvo-Libro kaj Revuo de l' Mondo. Entute pli ol 130 kajeroj. Aĉetemuloj skribu, kiom vi pretas pagi, al Viktor Bonde, Stenslundsvägen 20, S-79100 Falun, Svedujo.

S-ano M. Vanderlinden, Kliniko St. Vincent, 11, Deinze, Belgujo, deziras korespondaĵojn. Danko sekvos post saniĝo.

Por evoluada humanismo mi postulas vivecajn leter-interŝanĝojn (kaj estontajn fakajn rondkorespondadojn) pri novaj mondkalaj specialtemoj: a) famileco-humano b) personeco-kulturo c) komuneco-ekonomio d) novpopoleco-civito e) ekumeneco-fido. Sciigu vian propran preferosperton kaj decidu vian elektitan kunordigon, poste skribu al: S-ro François Leeb (Intermovado "Collegium", esperantsekretariado "Plafko-Keko"), 25 bis, ave. Joseph-Claussat, F-63 Chamalières, Francujo.

Eksportistoj - Importistoj sendu viajn proponojn al s-ro Paul Nzemba-Paku, Makleristo, B.P. 198, Limete (Kinshasa), Kongo (Dem. Resp.).

Ahmed Hussain Maa'tuk (14-jara) kaj fratinoj Ĥadiĝa (Khadija) (18-jara) kaj Zejnab (Zaynab) (12-jara) komencantoj ŝatas interŝanĝi bildkartojn. Husainiya str., Al-Ghubairi, Beirut, Libano.


Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12 rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Ĉu ekzistas en via lando: aŭ asocio por suferantoj de la neinfekta haŭt-malsano psoriaz, aŭ io medikamente interesa rilate al psoriaz? Respondu al: The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, NN1 5 AT, Britujo. Dankon!

Bonega angla gastdomo en sudorienta marborda urbo estas "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Britujo. Venu kaj lernu ankaŭ la anglan lingvon!

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Amosevej 5 A, Kopenhago 2700 Brh. daŭre akceptos ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Anton Huemer elsendas (vidu: "Karaj legantoj!")



KONCIZA HISTORIO PRI LA KORNVALA LINGVO KAJ ĜIA LITERATURO

de Geoffrey H. Sutton

"Hodiaŭ, eĉ kleraj angloj ofte ne scias, ke iam ekzistis kornvala lingvo; s-ro Sutton aŭtoritate forigis tiun mankon ĉe parolantoj de Esperanto."

"Esperanto" nov. '69

"... sincera aplaŭdo al la aŭtoro, kiel pro la bona ideo prezenti la lingvon al la esperantistaro, tiel ankaŭ pro la bonega prezentado mem."

"The British Esperantist" okt. '69

Mendu ĉe UEA aŭ BEA (2,— gld; 4/8 ŝ.) sendokostoj 10 %.

En 1970 aperos:

ABZ de Amo

de la danaj verkistoj Inge & Sten Hegeler.
La plej vendata libro de sia speco en Danlando — enciklopedio pri la kunvivo de plenkreskaj homoj — verkita por plenkreskaj homoj. Petu senpagan prospekton ĉe la eldonejo. Reduktita prezo je antaŭmendo.



Eldonejo Torben Kehlet, Ystadvej 11,
DK 2850 Naerum, Danlando



Multaj skribas

al mi, demandante, kial ne okazis en Helsinko la anoncita Literatura Recitalo. Do, por ke sciemuloj sciu: mi ne venis al 54a UK pro neprokrastebla tasko profesia. Ĉe nia 55a — se mi estos viva, sana kaj libera — kongresanoj povos spekti Literaturan Recitalon omaĝe al la plej granda rusa verkisto vivanta Aleksandr Solĵenicyn. Ĝis revido en Vieno!

Nikolaj Rytjkov



Universala Esperanta Stenografio.
Lernolibro por instrui sin mem
aperis sub la aŭspicioj de UEA kaj
de EKI.

(prezo: gld. 17.75 = 71 steloj).
Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich.

Ni solvis la problemon



kiel teni en bona ordo viajn ekzemplerojn de "Esperanto". Tiu ĉi bela bindilo permesas al vi aldoni en nuraj sekundoj ĉiun novan numeron de la revuo tuj post ĝia apero. Jam de la unuaj numeroj vi do havas pretan kolekton. Simpla sed efika sistemo certigas, ke la paĝoj kuŝas ebenaj por facila legado ĝis la meza rando. La bindilo konsistas el fortika kartono tegita per bonkvalita tolo, kun surprisitaj titoloj kaj surglueblaj jar-ciferoj. Mendu nun: nur 5,— gld.! (Oni ne pagas sendokostojn.)

ESPERANTISTA KULTURDOMO

(Fondinto: H. Micard)

Kastelo "GRESILLON"

59 — BAUGE — Francujo

KULTURAJ ARANĜOJ 1970

Allogaj programoj, ripozo en kampara bieno, kies verda parko kaj lageto formas rimarkindan juvelon. Turismo en valo de Luaro

PASKAJ FERIOJ: Vidu la januaran numeron.

DUM LA SOMERO:

1-a Periodo (28 jun. — 12 jul.):

SEMINARIO POR KURS- KAJ GRUPGVIDANTOJ
en formo de forumo kun dezirinda partopreno de lernantoj; rolo de teatro en la aktivigo de grupo aŭ kurso

2-a Periodo (12 — 26 jul.):

KULTURAJ KAJ TURISMAJ INTERNACIAJ FERIOJ

Teatro — Arto — Turismo

Prelegoj, aktorado, pupateatro, ekskursoj

3-a Periodo (26 jul. — 9 aŭg.):

ESPERANTAJ STUDIOJ

Tri kursoj, ekzamenoj - Ekskursoj

4-a Periodo (9 — 30 aŭg.):

KULTURAJ ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ

Diversgradaj kursoj, ekzamenoj, bindado, korbofarado, ekskursoj.

— Informiĝu ĉe la ĉi-supra adreso — Petu detalajn programojn —

Helsingör

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör okazos 19.-26. de julio en La Internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Aabyhøj, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAĴ HEJMOJ ĉe Aarhus, Danlando, 18. - 24. de okt. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

UNIKA VORTARO

Esperanto-juda kaj juda-Esperanta
de Harry Fineman

Plena vortaro por la jud-germana lingvo. Tole bindita. Grandformata, 149 + 316 p., 22 x 18 cm.
Prezo: 27,— gld. + sendokostoj 10 %

MIKSPOTO DE RASOJ,

lingvoj, kulturoj, modoj, kuir-arto kaj aliaj artoj estas Londono, facile atingebla ŝipe, aviadile, trajne, aŭte aŭ piede. Venu tien en 1971 por la Universala Kongreso de Esperanto (31 julio — 7 aŭgusto).

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA SCIIGAS :

Ekde la Novjaro 1970
pli ampleksa (ĉ. 200 paĝoj jare)
pli ofta (6 numeroj jare)

SCIENCA REVUO

kun regule aldonata
BULTENO de ISAE
kaj de ĝiaj sekcioj

Popularsciencaj kaj sciencaj artikoloj el diversaj sciencaj branĉoj. De tempo al tempo specialaj numeroj kun unufaka enhavo.

LA JARABONO (kune kun la kotizo al ISAE):
50 steloj pere de la delegita reto de ISAE
30 steloj por studentoj (pere de STELO)
4 us. dol. pere de UEA kaj de la libroagentoj.

La listo de la delegitoj de ISAE troviĝas en Scienca Revuo kaj en la jarlibro de UEA.

Favoraj prezoj por la plurjara aŭ dumviva abono.

De la ĝisnunaj volumoj haveblaj kompletaj nur 13-20 (unu volumo 20-30 stelojn).
Proveksempleroj ĉe la landaj delegitoj aŭ ĉe la sekretario de ISAE (Prof. Boz. Popovic, Og. Price 80, BEOGRAD, Jugoslavio)

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Dumonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj **diskonigu** ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

"Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj"

faka kunlaboranta asocio de U.E.A.

(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subtenanta 50; dumviva 300).

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO- FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esperanto de la Sanktaj Skriboj.

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852), Piazza Duomo 4 — 48100 Ravenna (Italujo).

Fondita en 1966

LA LINGUA INTERNAZIONALE

ESPERANTO

IAMA "L'ARALDO ESPERANTISTA" (1926)

Fondinto-Redaktoro: Konrado Cerri

Itallingva poresperanta gazeto.
Formato cm. 32 x 44. 4-paĝa. 5-kolona.
Papero flavkolora. Verda inko. Presita.
Ilustrita. Trimonata. Absolute neŭtrala.

Ne estas fiksita abonkotizo. Ĝi estas sendata al tiuj personoj itallingvoparolantaj, kiuj faras oferdonon (valoron de unu paketo da cigaredoj) kaj interesiĝas pri la internacilingva problemo. Faciligu la atingon de alta nombro da aŭtoritatuloj kaj lernejestroj en ĉiuj lokoj.

Klopodu regajni perditajn samideanojn!

Ekzistas multaj dekmiloj da itallingvoparolantoj, kiuj ne ricevas plu novaĵojn pri la esperanto-vivo. Klopodu regajni ilin al la esperanto-movado per tre malalta elspezo (it. L. 250).

Adresu : La Lingua Internazionale ESPERANTO,
(Direttore: Corrado Cerri)
Casella Postale 159
I-13051 BIELLA (Vc)

Pĉk: Corrado Cerri, n.5-742, I-13051 Biella (VC).